BEL informas

n-ro 11/2015

la 24an de junio 2015

24 de junho de 2015

2-a VINA furoris!

2º VINA arrasou!

La 2-a Vintra Aranĝo de BEJO, okazinta de la 4-a ĝis la 7-a de julio, okazis sukcese en la urbo Valinjo, apud Kampino (San-Paŭlo). Kreita post la ŝanĝo de naciaj kongresoj al januaro, ĝi intencas esti mezjara renkontiĝo de BEJO, junulara departemento de BEL. Desegnita por esti malgranda renkontiĝo en pli natura aŭ kampara regiono, favora al intimeca etoso, ĉi-jare ĝi allogis 16 homojn, inter ili la argentina kantisto Ale Kosabela, kiu donacis al ĉeestantojn ĵusnaskitajn kantojn, prezentitajn ĉe ligno-fajro dum stelplena vespero. Krom tiu unika momento, la junuloj ĝuis junian feston, dancis, kunpromenis en Valinjo, vizitis lokajn vinejojn, kunsidis por BEJO kaj - ĉefe - multe amikeme praktikis Esperanton! :) Atendu kompletan artikolon en **Brazila Esperantisto**. Sed dume vi povas kontroli fotojn en nia fb-paĝo: https://www.facebook.com/vintraarangxo.

O 2º Evento de Inverno da BEJO, de 4 a 7 de junho, aconteceu com sucesso na cidade de Valinhos, ao lado de Campinas, SP. Criado após a mudança dos congressos BKE-BEJK para janeiro, ele objetiva ser o encontro de meio de ano da BEJO, o departamento jovem da BEL. Formatado para ser um pequeno encontro em regiões com mais recursos naturais, que favorecem uma atmosfera intimista, este ano atraiu 16 pessoas, entre elas o cantor argentino Ale Kosabela, que presenteou os participantes com novas canções, apresentadas à volta de fogueira em uma noite estrelada. Além deste momento único, os jovens aproveitaram a festa junina, dançaram, passearam em Valinhos, visitaram adegas locais, participaram de reuniões da BEJO e, principalmente, praticaram Esperanto muito amistosamente! Aguarde artigo completo na revista **Brazila Esperantisto**. Mas enquanto isso, você pode conferir as fotos em nossa página no

Facebook: https://www.facebook.com/vintraarangxo.

BEJO

BEJO

Ĉu koincido? Esperanto ĉe la verda pavilono de la Bienalo

Coincidência? Esperanto no pavilhão verde da Bienal

AERĴ ankoraŭ ne posedas la stand-numeron, sed ĝi lokiĝos ĉe la Verda Pavilono en la Bienalo de Rio de Ĵaneiro, apud Globo Livros. La foto ne estas oficiala, sed montretas la gravecon de tiu ago. La verda krajono indikas la lokon. Se vi ankoraŭ ne mondonacis, bonvole konsideru helpi je tiu ago, kiu certe estos la plej grava por disvastigo de Esperanto en Brazilo en 2015. Eksciu kiel fari tion tie ĉi:

http://esperanto.org.br/bienal2015

AERĴ/BEL/BEJO

A AERJ ainda não tem o número do estande, mas estará no Pavilhão Verde na Bienal do Rio de Janeiro, ao lado da Globo Livros. A foto é não oficial, mas já dá o gostinho da grandeza desta ação. O local está indicado pelo lápis verde. Por favor, se você ainda não doou, considere ajudar nesta ação que provavelmente será a mais importante na divulgação do Esperanto no Brasil em 2015. Veja como aqui:

http://esperanto.org.br/bienal2015

AERJ/BEL/BEJO

Helpu junularon, sporton kaj Esperanton - kaj partoprenu lotumadon de poŝtelefono! :)

Ajude a juventude, o esporte e o Esperanto - e concorra a um celular! :)

Pedro Paulo de Freitas, 25 anos, de Ribeirão Preto-SP: BEJO-membro e camisa 10 da Seleção Esperanto.

BEJO lanĉis projekton por helpi ĉefe pri vojaĝkostoj brazilanojn elektitajn partopreni la internaciajn ludojn de TEFA - Tutmonda Esperanto-Futbala Asocio. Konu la projekton ĉi tie: https://goo.gl/eTosyv. La unua celo de tiu projekto estas helpi la talentan junulon Pedro Paulo de Freitas, elektita por ludi kiel ĉemizo 10 en la Selektitaro de Esperanto kaj kiu teame malfermos la Pokalon Zamenhof - historia afero realigita ene de la alternativa internacia (kaj neesperantista) futbala organizo NF-Boards.

A BEJO lançou um projeto para ajudar principalmente com os custos de viagem de brasileiros escolhidos para participar nos jogos internacionais da TEFA - Associação Mundial de Futebol e Esperanto. Conheça o projeto aqui: https://goo.gl/eTosyv. O primeiro objetivo do projeto é ajudar o jovem e talentoso Pedro Paulo de Freitas, escolhido para jogar como camisa 10 na Seleção do Esperanto e abrir a Copa Zamenhof - uma iniciativa histórica feita no âmbito da Organização de Futebol Internacional alternativa NF-Boards.

Ĉiuj rajtas monkontribui pere de la retejo

Sinta-se convidado a doar pelo site Vakinha:

Vakinha:

https://www.vakinha.com.br/vaquinha/projeto-gol-de-letra-com-chapeu-uma-vaquinha-esperantista-2015

Plej interese estas, ke por ĉiu 10 realoj oni rajtas peti po unu bileto por lotumado de poŝtelefono Nokia Lumia 635. :) Nepre partoprenu tiun historian aferon!

BEJO

https://www.vakinha.com.br/vaquinha/projeto-gol-de-letra-com-chapeu-uma-vaquinha-esperantista-2015

O mais interessante é que, a cada 10 reais, os "investidores" têm o direito de solicitar um bilhete de rifa para concorrer a um celular Nokia Lumia 635. :) Não deixe de fazer parte deste momento histórico!

BEJO

RENKONTO DE ESPERANTISTOJ EN PARAÍBA-VALO

Tenorjo prelegas

La 31-an de majo 2015 okazis en la urbo Lorena, ŝtato San-Paŭlo, Brazilo, unu plia tradicia renkonto de Esperantistoj en Paraíba-Valo. El tri brazilaj ŝtatoj kunsidis kvindeko da samideanoj por praktiki la lingvon en amika etoso. La tuttaga programo komenciĝis post komuna lunĉo per prelego de Márcio Santos kaj Maira Nobre, estraranoj de Esperanta Asocio Rio de Janeiro (AERJ). Ili prelegis pri la projekto **Esperanto en la Internacia Librofoiro de Rio de Janeiro**. Sekvis diskuto kun la ĉeestantaro. Post la tagmanĝo, oni prezentis "Guton da Gramatiko" (Paulo S. Viana). Sekve, prezentiĝis personaj ret-afiŝoj por faciligi la lernadon de gramatikaj punktoj (Frederico Salmi). Senparola filmeto diskutigis la ĉeestantojn por

ENCONTRO DE ESPERANTISTAS NO VALE DO PARAÍBA

Palestra do Márcio Santos

Em 31 de maio de 2015 teve lugar na cidade de Lorena, São Paulo, mais um encontro tradicional de falantes de Esperanto no Vale do Paraíba. Vindo de três estados brasileiros, reuniram-se cinquenta esperantistas para praticar a língua em uma atmosfera amigável. O programa do dia, depois do almoço em grupo, começou com uma palestra de Márcio Santos e Maira Nobre, diretores da Associação de Esperanto do Rio de Janeiro. Eles falaram sobre o projeto **Esperanto na Bienal do Livro do Rio de Janeiro**. Seguiu-se um debate com a platéia. Após o almoço, houve a apresentação "Guton de Gramatiko" (Paulo S. Viana), seguido da apresentação de postagens na rede para facilitar a aprendizagem de pontos gramaticais (Frederico Salmi). Um filme

lingvopraktikado (preparo kaj konduko de José Roberto Tenório). Fermis la renkonton diskuto kun la prezidantoj de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro kaj Esperanto-Asocio de San-Paŭlo pri la movado en tiuj ŝtatoj. La venonta renkonto en Paraíba-Valo okazos novembre, en la urbo Barra Mansa.

Informis: Paŭlo S. Viana/Fotoj: Nazaré Laroca

mudo levou os presentes à discussão pela prática da língua (o responsável pela atividade foi José Roberto Tenorio). Encerrou a reunião um debate com os presidentes da Associação de Esperanto do Rio de Janeiro e da Associação de Esperanto de São Paulo sobre o movimento nesses estados. A próxima reunião no Vale do Paraíba terá lugar no mês de novembro, na cidade Barra Mansa.

Informou: Paulo S. Viana/Fotos: Nazaré Laroca

ENKETO - Kongresa Taksado: BEL kaj BEJO volas scii vian opinion

ENQUETE - Avaliação dos Congressos: BEL e BEJO querem saber sua opinião

http://goo.gl/Wn5u18

Daŭre marŝas nia enketo pri la kongresa taksado. Se vi ankoraŭ ne respondis, partoprenu kaj helpu nin pliboniĝi por Esperanto en Brazilo. Por aliri musklaku la ligilon supre.

BEL/BEJO

Continua a enquete sobre a avaliação dos congressos. Se você ainda não respondeu, participe e ajude-nos a melhorar pelo Esperanto no Brasil. Para acessar, clique no *link* acima.

BEL/BEJO

Aliĝu al niaj komunumoj ĉe Facebook kaj Google +

Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google +

BEL invitas: vizitu kaj ŝatu nian paĝon ĉe facebook!

BEL convida: visite e curta nossa página no face!

www.facebook.com/brazilaesperantoligo

Ĉu vi jam realiĝis al BEL ?
Você já se refiliou à BEL ?

Malkovru en via BEL@Butiko

As Preposições em Esperanto

O estudo completo das preposições é fundamental no aprendizado de qualquer língua. No caso da língua internacional Esperanto, esta pequena obra de Celso Martins facilita este estudo, com explicações claras e objetivas, sempre acompanhadas de muitos exemplos que auxiliam a todos, mas especialmente àqueles que aprendem por conta própria. Seu tamanho pequeno auxilia o transporte e manuseio. Adquira agora, por apenas R$ 3,00:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/didatico/as-preposicoes-em-esperanto.html

BEL Informas/BEL@Butiko

Descubra em sua BEL@Butiko

Fundamento de Esperanto (Edição brasileira)

Chegou a obra fundamental do Esperanto, originalmente escrita em cinco línguas, agora também em Português, na elogiada tradução de Tulio Flores e bela edição da Liga Brasileira de Esperanto! Obra essencial para aqueles que querem um domínio excelente do Esperanto como língua e como história. Adquira agora, por apenas R$ 40,00:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/fundamento-de-esperanto-1224.html

BEL Informas/BEL@Butiko

AL BEL-MEMBROJ: POR RICEVI 10%-AN RABATON, PETU VIAN RABAT-KODON ĈE LA ADRESO:

belabutiko@esperanto.org.br

Vizitu vian virtualan butikon:

AOS MEMBROS DA BEL: PARA TER DESCONTO DE 10% NA COMPRA DE LIVROS, SOLICITE SEU CÓDIGO JUNTO AO ENDEREÇO:

belabutiko@esperanto.org.br

Visite a sua loja virtual:

www.belabutiko.esperanto.org.br

Francisco Mattos
belabutiko@esperanto.org.br

Ni laboru kune!

Boletim bilíngue da Liga Brasileira de Esperanto Dulingva bulteno de Brazila Esperanto-Ligo

SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902
Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Affonso Soares, Ana Ribeiro, Anna Lobo, Antonio Felix, Bert Schumann, Carlos Pereira, Diego Ribeiro, Emmanoel Lima, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fabio Monteiro, Fabio Santos, Fernando Maia, Flávio Gomes, Francisco Mattos, Joe Bazilio, Juliana Evandro, Lucas Barbosa, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Marcus Aurelius Farias, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes, Wesley Jefferson.

Sendu viajn novaĵojn al BEL informas

Ĉu vi deziras kontribui por la dulingva

Envie as suas notícias para o BEL informas

Você deseja contribuir com o boletim

informilo de BEL kaj BEJO sendante novaĵojn? Se jes, bonvole plenigu la formularon per la necesaj datumoj:

bilíngue da BEL e da BEJO, enviando novidades? Se sim, por favor preencha o formulário com as informações necessárias:

Sendu viajn novaĵojn

Ricevu BEL Informas per via retadreso
Receba BEL Informas em seu email

www.esperanto.com.br/bel